

mentaj Difinoj (IEC V² 05). Eld. de Pola Esp. — Asocio. 54p.; 14,8 x 21 cm; 610t.

Dum Februaro 1964 T. C. distribuis definitivan REKOMENDON de esperantlingva listo aneksa al la Grupo 12 — Magnetaj Transduktoroj — de la sama multlingva terminaro (IEC V² 12). Hektografie multobl.; 3p.; 29,7 x 21 cm; 36t.

Inĝ. Ludvig-Rudolph Welther, membro de la Elektroteknika Sekcio de ISAE, Bukureŝto, Rumanio, donace por FONDAĴO 'SCIENCO' sendis al T. C. po unu ekzempleron de la rusa eldono de la IEC V²; Grupo 11 — Statikaj Konvertoroj; Grupo 31 — Signalaj kaj sekuraparatoj por fervojoj; Grupo 35 — Elektromekanikaj aplikoj. 9-lingvaj. eld. 1963 en Moskvo, kun dif. en Ru, Fr kaj En. Eventuale T. C. okupiĝos pri traduko en Esperanton ankaŭ de ĉi tiuj »grupoj«.

621.793 **Farado de metalkovraĵoj (galvanizado ktp.).** — S-ro Jack A. McCarthy, 4421 Driftman Dr., Monroeville, Pennsylvania, Usono, verkis liston de terminoj pri la kovrado de metaloj kaj galvanizado, kiujn li uzis en teknikaj artikoloj tradukinte en Esperanton el la angla, Eo-En kaj En-Eo, 10p. 29,7 x 21 cm; stencile multobl.; ĉ. 240t.; Monroeville 1963.

623.1/.7; 355/359 **Militista Vortaro.** — S-ro Antonije Sekelj, Kondina 24, Beograd, Jugoslavio, proponas serioze alpaŝi krei seriozan militistan vortaron uzeblan por esperantigi la internacian armeojn de UNO. Li volonte partoprenos tiun laboron.

631.362; 66.023 **Aparato por mezuri la flukapablon de pulvoraj substancoj.** — La ĉi supre menciita Inĝ. Schiltknecht sendis al T. C. prospekton kun teknikaj klarigoj pri tia aparato uzata ĉe bunkroj, siloj, provizejoj ktp. Verkita en la lingvoj De, En, Fr kaj Eo.

634.9 **Forstekonomio kaj Ĉaso.** — Pri la aranĝo de forsta kaj ĉasa leksikono deziras kunlabori D-ro Ernst Kleemann, eksa superforstmajstro, Fritz-Kalle-Str. 26, 62 Wiesbaden, Germanujo.

R. H.

012 (Belinfante = 408.92)

ESPERANTAĴOJ EN LA TEORIA FIZIKO (Informo de la Terminologia Centro)

La 13-a paragrafo de la nova laborplano de ISAE temas pri **KOMPILO KAJ ELDONO DE LA BIBLIOGRAFIO PRI SCIENCAJ ESPERANTAĴOJ.** En tian bibliografion nepre apartenas jena listo de artikoloj kaj resumoj verkitaj esperantlingve dum la jaroj 1944—51 de Prof. D-ro Frederik J. Belinfante (Dept. of Physics of Purdue University, West Lafayette, Indiana, Usono), fervora pioniro pri Esperantoterminologio en la fizika kampo kaj kunlaborinto pri la Scienca kaj Teknika Terminaro:

- 1) On the longitudinal and the transversal Delta-function, with some application. Institut voor Theoretische Natuurkunde der Rijks-Universiteit, Leiden. Physica XII, no 1, Apr. 1946. (Resumo en Esperanto.)
- 2) On the vanishing of $\text{div } \varphi - 4\varrho \pi$ in quantumelectrodynamics. Institut voor Theoretische Natuurkunde der Rijks-Universiteit, Leiden. Physica XII, no 1, Apr. 1946. (Resumo en Esperanto.)
- 3) Supermultatempa Teorio por Mezonaj Kampoj. Ekstra presajo en Esperanto el »Progress of Theoretical Physics«, Vol. III, no 4, Oct-Dec 1948.
- 4) Pri la Kalkulado de Elektromagnetaj Fenomenoj per Kampo de neŭtraj vektor-mezonoj kun neglektebla maso. Ekstra presajo el Progress of Theoretical Physics, Vol. IV, no 2, Apr-Jun 1949.
- 5) Pri la nuna stato de la kvantumteorio de kampoj de elementaj korpuskloj interagantaj (p. 100—104) kaj Pri la nomoj de elementaj korpuskloj kaj de kelkaj instrumentoj (p. 98—99). Sciencia Revuo, Vol. 1 (1949), n-ro 3, p. 93—104.

- 6) »Integro-kaŭzeco« en konverĝa kvantumteorio de kampoj. *Progress of Theoretical Physics*, Vol. 6, no 2, March-April 1951. La menciitaj 6 artikoloj kaj resumoj aperis kiel ekstrapresaĵoj, kies po unu ekzemplero troviĝas ĉe TC de ISAE.
- 7) *Undor Calculus and Charge-conjugation* (Resumo« en Esperanto). *Physica* 6, 849 (1939).
- 8) *The Undor Equation of the Meson Field* (»Resumo« en Esperanto). *Physica* 6, 870 (1939).
- 9) *On the Spin Angular Momentum of Mesons* (»Resumo« en Esperanto). *Physica* 6, 887 (1939).
- 10) *On the Covariant Derivative of Tensor-Undors* (»Resumo« en Esperanto). *Physica* 7, 305 §1940).

Ekstraj presaĵoj de ĉi tiuj esperantaĵoj elĉerpiĝis.

Krom tiuj publikigitaj esperantaĵoj D-ro F. J. Belinfante verkis en la somero de 1944 kelkajn resumojn de artikoloj anglalingvaj, kiuj neniam estas publikigitaj, sed de kiuj trakopio troviĝas ĉe TC, nome:

- 11) *A Note on the Classical Theory of the Radiation Reaction of Electrons, and the So-Called Proper Field.*
- 12) *Gauge-Independent Quantization of Bopp's Electrodynamics.*
- 13) *A Note on the Perturbation of Matter by Matter by Other Fields.*
- 14) *Electron Self-Interaction Through Retarded Fields.*
- 15) *Why the electrodynamic potentials A and ϕ don't just from a four-vector that should be visualized as a fixed arrow in four-dimensional space.*

Estas dezirinde ke niaj sciencistoj-esperantistoj ekde nun pli favore verku artikolojn kaj resumojn en la Internacia Lingvo, por ke pliriĉiĝu nia bibliografio pri sciencaj esperantaĵoj.

R. H.

MIKSPOTO

551.57 : 631 (4) = 20

001.83 (100) : 40892

En recenzo pri libro 60-paĝa de nederlandaj autoroj J. C. J. MOHRMANN kaj J. KESSLER: »WATER DEFICIENCIES IN EUROPEAN AGRICULTURE«, la recenzanto, G. F. Makkink, skribas: »Fine sekvas 12 paĝoj kun resumoj en la lingvoj angla, germana, franca kaj hispana. Pro la malmulta kono de alilandaj inĝenieroj pri la angla lingvo (Unesko-raporto, Ĝenovo, 1958), serve al la akvobezonaj regionoj, nesuperflujaj estus resumoj ankaŭ en la itala, nov-greka, kroata, pola kaj rusa lingvoj. Oni povas konstati ke, tuj kiam oni provas disvastigi sciindaĵojn pri Europo, oni puŝiĝas kontraŭ lingvajn barojn. Nun, kiam la mondo disponas pri Esperanto, kiu pli taŭgas por tiu tasko ol la angla kaj kiu por ĉiu estas tre facile alproprigebla, estas postulo de senromantisma efikeco uzi ĝin por ĉi tiaj publikigaĵoj.«

582.29 (243.3) (048) = 089:2

En Revue Bryologique et Lichénologique 28 396-397 (1959) s-roj

Glauzade kaj Rondo de la Universitato de Marseille aperigis resumon en Esperanto de tre interesa artikolo pri la likenoj de Alpoj.

Al s-ino Allorge, la direktorino de ĉi tiu plej grava franca revuo dediĉita al la studo de la muskoj kaj likenoj, kaj al la aŭtoroj ni esprimas niajn dankon kaj gratulojn. La adreso de la revuo estas:

REVUE BRYOLOGIQUE ET LICHENOLOGIQUE,
MUSEUM NATIONAL D' HISTOIRE NATURELLE.

Rue de Buffon,
PARIS V. FRANCUJO